

Christian Morgenstern,

Renkonto

tradukita de Willy Nüesch

Ni sidis ĉe du tabloj - lok' ? - en mond' ...
 Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!
 Ni sidis ie en la vivoregno...
 Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,
 se mi en ĉi okulojn versi rajtus -
 se rekompencus min ĉi reĝa buŝo -
 kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,
 pro kio vi profunde min ekscitas -
 ke mi genuojn viajn amus braki -
 kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.
 Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -
 kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -
 eliris - kaj nin plu neniam vidis.

*Traduko de la Germana poemo "Begegnung" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 - †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresadon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.